

**KION ĈI TIO SIGNIFAS PRAKTIKE?**

Vi verŝajne demandas, kiel vi povas helpi abolicii besto-ekspluatadon.

Ekzistas io, kion vi povas fari.

Vi povas fariĝi vegano. Nun. Veganismo signifas, ke vi ne plu manĝas aŭ alimaniere konsumas bestoproduktaĵojn.

Veganismo ne temas nur pri dieto; temas pri morala kaj politika sindediĉo al abolicio, unuopulnivele, kaj efikas elektojn ne nur de manĝaĵoj, sed ankaŭ de vestaĵoj, aliaj produktaĵoj, kaj aliaj personaj agoj kaj elektoj.

Veganismo estas la unu afero, kiun ni povas fari hodiaŭ—tuj—por helpi bestojn. Ĝi ne postulas multe-kostan kampanjon, membrecon en granda organizaĵo, leĝreformojn, aŭ ion ajn krom nia rekono, ke se 'bestaj rajtoj' signifas ion, ĝi signifas ke ni ne povas pravigi la mortigadon kaj manĝadon de bestoj.

Veganismo malpliigas suferigadon kaj mortigadon de bestoj per malpliigi merkatan mendadon. Ĝi reprezentas malakcepton de la vareco de nehomoj, kaj rekonon de ilia esenca valoro.

Veganismo ankaŭ temas pri sindediĉo al senperforto. La movado por bestaj rajtoj estu movado por paco, kaj malakceptu perforton kontraŭ ĉiuj bestoj—homaj kaj nehomaj.

Veganismo estas la plej grava formo de politika aktivado, kiun ni povas partopreni por helpi bestojn.

Kaj post via veganiĝo, ekeduku viajn familion, amikojn, kaj samkomunumanojn, por ke ankaŭ ili veganiĝu.

Se ni volas abolicii besto-ekspluatadon, vegana movado estas necesa antaŭpostulo. Kaj tiu movado komenciĝas per la decido de la unuopulo.

**SED KIAL MALBONAS MANĜADO DE BESTOPRODUKTAĴOJ KROM VIANDO?**

Ne ekzistas signifoplena distingo inter viandomanĝado kaj laktaĵmanĝado, aŭ manĝado de aliaj bestoproduktaĵoj. Bestoj ekspluatataj por lakto, ovojn, aŭ aliaj produktaĵoj estas traktataj same malbone aŭ pli malbone ol 'viandaj' bestoj, kaj ili finas siajn vivojn en la sama buĉejo, ilia viando de ni manĝota.

**Estas same multe da suferado kaj morto en glaso da lakto, glaciaĵo, aŭ ovo, kiel en bifesteko.**

Pretendi, ke ekzistas morala distingo inter viandomanĝado kaj manĝado de laktaĵoj, ovojn, kaj aliaj bestoproduktaĵoj estas tiom sensece kiom pretendi, ke ekzistas morala distingo inter manĝado de grandaj bovoj kaj manĝado de malgrandaj bovoj.

Tiom longe, kiom 99% da homoj pensas, ke estas akceptebla konsumi bestoproduktaĵojn, nenio vere ŝanĝiĝos por bestoj.

**Do...**

La decido estas al vi. Neniu povas decidi por vi. Sed se vi kredas, ke la vivoj de nehomoj havas moralan valoron, ĉesu partopreni la mortigadon de bestoj, senkonsidere de kiom 'humane' ili estas traktataj.

Aliĝu al la aboliciisma movado hodiaŭ. Fariĝu vegano. Hodiaŭ. Estas facile veganiĝi. Kaj ĝi estas la elekto morala.

Por pli da informoj, vizitu la retpaĝon The Abolitionist Approach (La Aboliciisma Metodo) ĉe:

[www.AbolitionistApproach.com](http://www.AbolitionistApproach.com)

© 2008 Gary L. Francione & Anna E. Charlton.

Disdonado per aliaj unuopuloj aŭ organizaĵoj ne necese indikas aprobon de la aŭtoroj pri iuj ajn vidpunktoj, krom tiuj enhavataj ĉi tie, kiujn eble esprimas tiuj unuopuloj aŭ organizaĵoj.

Tradukita de Niko Kalivoda.

# BESTA RAJTOJ

LA ABOLICIISMA METODO

WWW.ABOLITIONISTAPPROACH.COM

**BESTOJ: NIA MORALA SKIZOFRENIO**

Ni pretendas taksu bestojn serioze.

Ni ĉiuj konsentas, ke estas malmorale 'necesese' suferigi aŭ mortigi bestojn. Sed kion ni intencas per tio?

Senkonsidere de ĝiaj aliaj implicoj, ĝi devas signifi, ke estas malmorale suferigi aŭ mortigi bestojn nur pro plezuro aŭ amuzo, aŭ pro oportuneco, aŭ pro simpla rutinemo.

Sed la grandegan plejmulton de nia besto-uzado—preskaŭ ĉiom da ĝi—ni povas pravigi per nenio krom plezuro, amuzo, oportuneco, aŭ rutinemo.

La plejparton de bestoj oni mortigas por manĝi. Laŭ la Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo (FAO) de la Unuiĝintaj Nacioj, homoj mortigas proksimume 53 miliardojn da bestoj—t.e. 53.000.000.000—por manĝi ĉiujare, neinkluzive de fiŝoj kaj aliaj marbestoj.

145 milionoj.....mortigitaj ĉiutage  
6 milionoj.....mortigitaj ĉiuhore  
100.000.....mortigitaj ĉiuminute  
1.680.....mortigitaj ĉiusekunde

Kaj ĉi tiu nombro pligrandiĝas, kaj duobliĝos en la dua parto de la nuna jarcento.

Kiel ni povas pravigi ĉi tiun buĉadon?

**Ni ne povas pravigi ĝin per diri, ke ni bezonas manĝi bestoproduktaĵojn por nia sano.** Ni klare ne bezonas fari tion. Fakte, indikaĵoj pli kaj pli montras, ke bestoproduktaĵoj estas difektaj kontraŭ homa sano.

**Ni ne povas pravigi ĝin per diri, ke ĝi estas 'natura' ĉar homoj manĝadis bestojn dum miloj da jaroj.** La fakto, ke ni faris ion longatempe ne igas ĝin morala.

**Ni ne povas pravigi ĝin, kiel necesan por tutmonda ekologio.** Pligrandigas la konsento, ke besto-agrikulturo estas naturmedia katastrofo.

Laŭ la FAO, besto-agrikulturo produktas pli da forcejefikaj gasoj ol benzinuzado en aŭtoj, kamionoj, kaj aliaj veturiloj.

Brutoj uzas 30% da la tuta grunda tersurfaco, inkluzive de 33% da la tutmonda kultivebla grundo, kiu estas uzata por produkti brut-nutraĵojn.

Besto-agrikulturo rezultigas arbardetruadon, ĉar arbaroj estas detruataj por krei spacon por novaj paŝtejoj, kaj gravan kaj vastegan grundodegradadon pro tropaŝtado, kompaktado, kaj erozio.

Besto-agrikulturo minacas la mondajn malabundiĝantajn akvo-rimedojn. Grandaj kvantoj da akvo estas bezonataj por produkti brut-nutraĵojn, vastega tropaŝtado perturbas akvo-ciklojn, kaj besto-agrikulturo estas grava fonto de akvopoluado.

Bestoj konsumas pli da proteino ol ili produktas. Por ĉiu kilogramo da bestoproteino produktata, bestoj konsumas meznombre preskaŭ 6 kilogramojn da plantoproteino de grajnoj kaj furaĝo.

Bezonataj estas pli ol 100.000 litroj da akvo por produkti unu kilogramon da bovaĵo, kaj proksimume 900 litroj por produkti unu kilogramon da tritiko.

Ĉar bestoj konsumas tiom multe pli da proteino ol ili produktas, grajnoj kiujn konsumu homoj estas anstataŭe konsumataj de bestoj. Tial, kune kun aliaj faktoroj, besto-agrikulturo kondamnas multajn homojn al malsatego.

La nura pravigo, kiun ni havas por suferigi kaj mortigi 53 miliardojn da bestoj ĉiujare estas, ke plaĉas al ni manĝi ilin; ke estas oportune al ni manĝi ilin; ke temas pri rutino.

Alivorte, ni havas neniun bonan pravigon.

Nia pensado pri nehomaj bestoj estas tre konfuzita. Multaj el ni vivas, aŭ foje vivis, kun "amikaj" dombestoj kiel hundoj, katoj, kunikloj, ktp. Ni amas ĉi tiujn bestojn. Ili estas gravaj familianoj. Ni lamentas ilin, kiam ili mortas.

Sed en aliajn bestojn ni metas forkojn, kaj tiuj bestoj estas neniel malsamaj de tiuj, kiujn ni amas. Tio estas sensencaĵo.

### **NIA TRAKTADO DE BESTOJ**

Ni ne nur uzas bestojn por plurspecaj kialoj, kiuj ne povas esti konsiderataj 'necesaj'; ni ankaŭ traktas ilin per manieroj, kiuj estus konsiderataj torturo, se temus pri homoj.

Ekzistas leĝoj pri bestobonfarto, kiuj postulas, ke ni bestojn traktu 'humane', sed ĉi tiuj leĝoj estas grandparte sensubstancaj ĉar bestoj estas posedaĵoj; ili estas ekonomiaj varoj, kun neniu valoro krom tiu, kiun ni donas al ili. Laŭ la perspektivo de la leĝo, nehomaj bestoj neniel mal similas de aŭtoj, mebloj, aŭ iaj ajn aliaj posedaĵoj, kiujn ni havas.

Ĉar bestoj estas posedaĵoj, ni ĝenerale permesas al homoj uzi bestojn por ĉia ajn kialo, kian ili deziras, kaj terure suferigi ilin dum la procedo.

### **KIAL NI NE AKIRU PLI BONAĴN LEĜOJN KAJ INDUSTRIAJN REGULOJN?**

La plejparto de bestoprotektaj organizaĵoj en Usono kaj Eŭropo pretendas, ke la solvo al la problemo de besto-ekspluatado estas plibonigi bestobonfartleĝojn, aŭ premi industriojn por plibonigi la traktadnivelon.

Ĉi tiuj organizaĵoj kampanjas por pli 'humanaj' buĉmetodoj, pli 'humanaj' katensistemoj, kiel pli grandaj kaĝoj ktp. Iuj el tiuj organizaĵoj pretendas, ke per plibonigi traktadon, besto-uzado iutage finiĝos entute, aŭ almenaŭ estos multe malpliigita.

Sed ĉu ĉi tio estas la ĝusta solvo? Ne, ĝi ne estas.

La ekonomio funkcias tiel, ke bonfarto-reformoj mal multe, aŭ eĉ neniom, plibonigas la situacion. 'Senkaĝa' ovo postulas same multe da suferado kiel normala ovo.

**La ideo, ke besto-ekspluatado fariĝas pli 'humana' kuraĝigas la publikon fariĝi pli komforta pri besto-uzado, kaj ĉi tio kuraĝigas daŭran konsumadon de bestoproduktaĵoj kaj eble eĉ plimultigas la tutan suferadon kaj mortigadon.**

Plie, estas neniu ajn pruvo, ke bonfarto-reformoj gvidos al finon de besto-uzado, aŭ multe malpliigos besto-uzadon. Ekzistas leĝoj pri bestobonfarto jam dum pli ol 200 jaroj, kaj ni nun ekspluatas pli da bestoj per pli teruraj metodoj ol dum iu ajn alia epoko en la homa historio.

Kaj, plej grave, reformado de ekspluatado ignoras la fundamentan demandon: kiel ni povas pravigi la uzadon de bestoj kiel rimedoj—senkonsidere de kiom 'humane' ni ilin traktas.

### **KIO ESTAS LA SOLVO?**

La solvo estas abolicii la ekspluatadon de bestoj, ne reguligi ĝin. La solvo estas rekonii, ke samkiel ni rekonas, ke ĉiu homo, senkonsidere de siaj specifaj trajtoj, havas la fundamentan rajton ne esti traktata kiel la posedaĵo de aliulo, ni devas rekonii ke ĉiu perceptipova (percepte konscia) nehomino ankaŭ havas tiun rajton.